Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Junio 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 6 (1176)

ISSN 1163.0442

5 €

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj,
mi devigas min verki tiun ĉi redaktoran komunikon malgraŭ la impreso ke neniu legas ĝin.
Ja, regule mi invitas vin helpi al mi en la redaktado de nia Sennaciulo per sendo de viaj kunlaboraĵoj, sed mi ne konstatas ian ajn efikon de tiuj invitoj. Ankaŭ sendu kritikojn, rimarkojn kaj proponojn por ke ni tiel faru kiel eble plej interesan gazeton de la neneŭtrala Esperanto movado. Ni faru ĝin tiel ke en ĝi oni povu legi tion, kion oni ne trovas en aliaj E-gazetoj. Ja, nia avantaĝo estas ke ni povas trakti la temojn kiujn la organoj de neŭtralaj E-asocioj laŭstatute ne povas.
Do libere esprimiĝu, ĉar ĉe SAT ne ekzistas tabuoj.
Esperante ke ĉifoje mia alvoko ne estos vana, mi plej kamaradece salutas vin,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

ATENTIGO AL NIAJ MEMBROJ PRI SAT-ADRESARO

Kiel ni jam informis vin, ni havas teknikajn problemojn pro kiuj la nova SAT-Adresaro ĝis nun ne aperis. Nia kamarado Floreal Gabalda, kiu respondecas pri la preparo de la Adresaro por la presejo, pro profesiaj kialoj devis foresti el Francio kaj ne havis tempon por fari tiun laboron. Fine li sendis al ni antaŭ unu monato faritan dokumenton kiu nun tute ne plu estas aktuala, ĉar intertempe okazis multaj ŝanĝoj. Do, ne valoras tuj presi ĝin, ĉar ĝi ne plu estas aktuala. Ni devas nun ĝisdatigi ĝin.
Intertempe ni regule aperigas en Sennaciulo ĉiujn informojn pri la ŝanĝoj en nia asocio, la novaliĝantojn kaj forpasintojn.
Pro manko de laborfortoj, tiu adresaro malfruas sed tuj kiam eblos, ni aperigos ĝin. Ni petas vin pri via komprenemo.

La SAT-oficejo


KOREKTO - ADRESO DE HISPANA PERANTO

En la maja Sennaciulo elfalis parto de la adreso de nia hispana peranto. Ni pardonpetas kaj ripetas la bonan adreson :

Pedro A. Hernandez Ubeda
c/Candilejas, 26 - 1° izda
ES-28018 MADRID
Hispanio

S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !



Nova PIV aperis !
Akiru ĝin ĉe SAT.
Prezo:70 € + afranko
Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €
ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

RAPORTO DE LA PLENUM-KOMITATO

por la periodo de aŭgusto 2002 ĝis majo 2003

Plenum-Komitato

Post la kongreso en Alikanto la malnova P.K. devis plenumi sian rolon ĝis la referendumo kaj la elekto de la nova. K-do Jacques Bannier plenumis la rolon de la prezidanto de la P.K, post la forpaso de k-do Peyraut. Ĝis la rezultato de la referendumo la malnova P.K. plenumis diversajn kurantajn taskojn. Fine de januaro okazis kribrado de la voĉdoniloj kaj la nova P.K. estis elektita. Ĉiuj kandidatoj estis elektitaj kaj la detalaj informoj pri la rezultato aperis en la marta numero de Sennaciulo. La nova P.K. elektis inter si la prezidanton de la P.K. Estis elektita k-do Jakvo Schram. Kiel vicprezidanto estis elektita k-do Guy Cavalier. La novaj PK-anoj interkonsentis inter si pri la taskoj kiujn ili plenumos kadre de la P.K. Ĉiuj povas partopreni fizike la kunsidon en la SAT-sidejo en Parizo, sed same ĉiuj povas uzi interreton por doni sian opinion. Kutime la parizaj geamikoj venas al la sideja-kunsido kaj krome ankaŭ plenumas la fizikan laboron kiu necesas por diversaj aferoj. La neparizaj PK-anoj vigle partoprenas la debatojn pere de interreto, kiu bone funkcias danke al bona organizado.

Deklaro de la P.K. kontraŭ la milito - Pro la militpreparo kontraŭ Irako, la P.K. decidis fari publikan deklaron kontraŭ tiu ĉi kaj ĉiuj militoj ĝenerale. Tiu ĉi deklaro aperis frontpaĝe en la februara numero de Sennaciulo kaj ankaŭ en la TTT-paĝoj de SAT kun la subskribkampanjo kontraŭ la militoj. Multaj SAT-anoj kaj ne-SAT-anoj el la tuta mondo subskribis kaj daŭre subskribas ĝin.

La Ondo de Esperanto -En la revuo “La Ondo de Esperanto” aperis tre perfida artikolo pri SAT de iu nekonata “komitatano Z”, kiu tre malutilas al ĝenerala Esperanto-Movado. La P.K. decidis aperigi tiun ĉi artikolon en Sennaciulo kaj invitis niajn membrojn sendi siajn reagojn al tiu gazeto.

Nova komputilo - Pro la paneo de la malnova komputilo kaj necerteco (granda kosto) de la sukcesa riparo, la P.K. decidis aĉeti novan komputilon kaj peti al niaj membroj financan subtenon por tiu aĉeto. La nova komputilo jam estas aĉetita kaj tiu ĉi raporto jam estas tajpita per ĝi. Kelkaj gekamaradoj jam sendis sian subtenon al tiu celo. Dankon al ĉiuj.

Eŭropa Sociala Forumo (E.S.F.) - Fine de la jaro (12-16.11.2003) okazos en Parizo, Saint-Denis, Eŭropa Sociala Forumo. La P.K. de SAT decidis ke SAT aliĝu al tiu evento kaj invitas ĉiujn niajn membrojn aktive partopreni kadre de SAT.

Membraro

Kiel ĉiujare ni povas konstati kun bedaŭro ke pluraj malnovaj fidelaj gekamaradoj forlasis nin pro forpaso kaj ke ne multaj novaj alvenas. La nova P.K. decidis pristudi tiun gravan problemon, prezenti ĝin al la kongreso en Ĉaŭdefono kaj serĉi la solvon. Ni ĉiuj konscias ke la problemo estas tre grava sed ni estu optimistaj kaj agu en tiu senco. Nia neneŭtrala asocio donas al multaj esperantistoj kiuj ne deziras nur babili pri la lingvo kaj lingvaj problemoj, eblecon agi politike, ekologie ktp, uzante nian komunan sennaciecan lingvon. Nia asocio estas malfermita al ĉiuj kiuj kredas ke la pli bona Mondo estas ebla. Ni invitas ĉiujn niajn membrojn klarigi tion al siaj esperantistaj geamikoj kiuj ankoraŭ ne konas SAT. Ili venu kaj konvinkiĝu pri la demokrateca kaj progresema karaktero de SAT, kie ne gravas etno, civitaneco, haŭtkoloro, lingvo, kredo, kulturo. Ĉiuj estas bonvenaj kaj ĉiuj kune ni faros “unu homan rondon familian”.

Administrado

Neniu ŝanĝo okazis en la administrejo de SAT. K-do Barkoviĉ daŭre zorgas pri sekretariado, ĝenerala sekretariado kaj pri ĉiuj oficejaj laboroj. Nia kasistino, k-dino Sabatier daŭre venas unufoje semajne por prizorgi la kasajn kaj kontadajn taskojn. K-do Bannier kun la edzino daŭre zorgas pri la ekspedo de Sennaciulo kaj S.R.

Kasa raporto - jaro 2002 aperos en julia numero

Rilatoj kun LEA-oj

Niaj rilatoj kun la LEA-oj estas daŭre bonaj. Bedaŭrinde, la problemo pri HALE (Hispana LEA) montriĝis grava. Tiu asocio ne prezentis sin al la lasta LEA-komitato en Alikanto, kiun tamen partoprenis pluraj junaj hispanaj kamaradoj kaj kiuj plendis pri la agado de HALE. Anstataŭ propagandi SAT en la hispanaj medioj, ĝi daŭre en sia organo “Kajeroj el al Sudo” akre kritikis SAT. Krome, ĝi eĉ malfermis siajn kolumnojn al falangisto, kio estas absolute kontraŭa al la ideoj kaj celoj de SAT. Pro la malkontento kaj neakcepto, la plej multaj membroj de HALE forlasis ĝin kaj kreis novan maldekstran asocion SATEH kiu deziras aliĝi al LEA-komitato anstataŭ HALE. Tiun problemon traktos LEA-komitato en Ĉaŭdefono.

Ni daŭre invitas ĉiujn LEA-ojn bone klarigi al siaj membroj kaj novaj esperantistoj en siaj lingva teritorioj, kia estas la diferenco inter LEA kaj SAT. La dua tasko de la LEA post la diskonigado de Esperanto estas varbado de novaj membroj al SAT.

Rilatoj kun TANEF

Tre bonaj rilatoj kun tiu asocio daŭras. Ĉi-jare (en 2003) okazos denove antaŭkongreso organizata de TANEF.

Konflikt-Komisiono

Post la elekto de la Nova P.K. la Konflikt-Komisiono restis sen sia sekretario. Dum la kongreso ni devas elekti novan Konflikt-Komisionon. Ni ne forgesu ke la sekretario de la Konflikt-Komisiono estas samtempe sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro.
Feliĉe dum la pasinta periodo okazis nenia konflikto inter la SAT-anoj.

Ĝenerala Konsilantaro

La Ĝenerala Konsilantaro, plejparte ligita pere de interreto, akceptis, legis kaj aprobis la protokolojn kiujn ili ricevis de la Ĝenerala Sekretario de la Plenum-Komitato de SAT. Neniu serioza kritiko okazis pri la laboro de la Plenum-Komitato.
Sola problemo estis la momento kiam HALE, LEA-o el Hispanio, volis havi Jesuo De Las Heras Jimenez kiel reprezentanton de HALE en la Ĝenerala Konsilantaro. Post mallonga diskuto estis decidita ke la Kongreso de SAT decidos : "Ĉu, persono kiu ne estas membro de SAT, povas reprezenti Sendependan Asocion HALE kvankam ligita al SAT pere de Gotenburga Konvencio en la Ĝenerala Konsilantaro"? Ĝis la fina decido de la Kongreso, s-ro Jesuo De Las Heras Jimenez ne povas partopreni la diskutojn kaj decidojn de la Ĝenerala Konsilantaro.
La sekretario de Ĝenerala Konsilantaro, k-do Jakvo Schram devis, laŭstatute, forlasi la Ĝ.K.-on la 1an de marto kiam li transiris al la Plenum-Komitato de SAT. Pri nova sekretario de Ĝ.K. decidos la 76-a SAT - Kongreso en Ĉaŭdefono.

Jakvo Schram (34781)
Sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT (ĝis 30-02-2003)

Landaj Perantoj

Ĉi-jare okazis grava perdo en la vicoj de niaj landaj perantoj. Pro trafikakcidento mortis k-do Gilbert Ledon, nia brazila peranto. Tio estas tre grava perdo por SAT, ĉar Gilbert estis tre efika kaj aktiva peranto. Danke al lia aktiveco nia kolektivo en Brazilo estis daŭre unu el la plej grandaj. Post la akcidento ni kontaktis lian filinon Lilia kun propono al ŝi daŭrigi la perantlaboron de sia patro. Bedaŭrinde, ĝis nun ni ne ricevis respondon. Se ŝi pro iu kialo ne povos plenumi tiun taskon, ni havas proponon de k-do Lunazzi kiu pretas transpreni de ŝi tiun taskon. Ni ricevis ankaŭ peton de nia juna hispana peranto, al kiu ĵus naskiĝis filineto, ke oni anstataŭu lin, ĉar pro trookupiteco li ne sukcesas plenumi sian perantan taskon. Ni petas hispanajn gekamaradojn anonci sin por tiu tasko. En Malagasio akceptis la taskon de perantino, nia k-dino Lala.

Sennaciulo

Nia organo Sennaciulo daŭre aperis 16-paĝa. Kun la bedaŭro de la redaktoro, ĝi ne sukcesas konstante havi regulajn rubrikojn pro manko de regulaj kunlaborantoj. La enhavo dependas de la ricevita materialo. Malgraŭ la daŭra invito de la redaktoro al la kunlaboro, nur kelkaj kamaradoj sendas de tempo al tempo interesajn tekstojn. Tre ofte la redaktoro devas mem serĉi la materialon kaj elturniĝi. Do, ne atendu ke aliaj verku sed informu la aliajn pri la eventoj aŭ sociala kaj politika situacio en viaj teritorioj, partoprenu en la diskutoj inter la SAT-anoj. Helpu ke nia gazeto fariĝu la ĉefa maldekstra supertendenca gazeto de Esperanto-movado.

Sennacieca Revuo

Post iom longa tempo finfine vi ricevis kun la aprila Sennaciulo ankaŭ duoblan numeron de nia prestiĝa Sennacieca Revuo. Ĝia nova redaktoro, k-do Jakvo Schram, promesas ke estonte la Revuo regule aperos ĉiujare antaŭ la SAT-kongreso, sed ankaŭ li bezonas interesan kaj kvalitan materialon. Se vi havas pli profundajn kaj pli ampleksajn artikolojn, sendu ilin rekte al la redaktoro : Jakvo Schram, Hof Ter Bekestraat 49, BE-2018 Antwerpen, Belgio, rete: <pagadoro@skynet.be>

Eldonoj, librovendado

Post la apero de la Nova PIV krom la antaŭmendoj, alvenis multaj mendoj de la libroservoj kaj individuoj. Nun tiu mendoritmo trankviliĝis. Bedaŭrinde la aliaj SAT-eldonaĵoj daŭre ne vendiĝas, kaj tio estas vera problemo. Ja, SAT-kiel kultura kaj eduka asocio nepre devus regule eldonadi novajn gravajn verkojn, sed ni ne povas investi en librojn kiujn ni ne vendas. Poste restas stokoj kiuj flaviĝas. Eĉ la tre valoraj lastaj eldonaĵoj kiel "Vualo de l'silento", "La Fremdulo", "La Universalismo" ne vendiĝas.

SAT kaj la reto

La reto estas pli kaj pli uzata rimedo por la debatoj kaj informoj inter la SAT-anoj. Pri la debatoj regule aperas resumoj por tiuj kiuj ne posedas kaj ne sekvas ilin en la reto. Do la reto fariĝas neevitebla ilo en la manoj de esperantistoj kaj SAT-anoj. Danke al ĝi niaj nefrancaj PK-anoj povas partopreni al la kunvenoj de la P.K. kaj same la Ĝeneralaj Konsilantoj povas facile komuniki inter si kaj kun la P.K.

Filatela servo

Nia k-do Modesto Ramelli, 11 impasse Moulin Neuf, FR-57160 Chatel St. Germain, Francio, daŭre klopodas vendi de vi ricevitajn poŝtmarkojn kaj tiel havigi al SAT iom da mono. Viajn poŝtmarkojn bonvolu sendi laŭeble rekte al la ĵus indikita adreso kaj ne al la SAT-sidejo. Dankon.

Amikeca Reto

Tiu ĉi SAT-servo daŭre bone funkcias. Ĉiujn informojn pri ĝi vi povas legi en la reto ĉe la adreso: <http://www.creaweb.fr/a.reto>

Junulfako

Jen la ricevita raporto de la Junulfako:

Agadraporto de la Junulfako 2002-2003

Sur la gazeta kampo, la agado denove estis nekontentiga. Aperis nur unu numero de LJP fine de Aŭgusto. Absolute neniu sendis ian kontribuon de tiam, kaj ni ne disponis sufiĉan tempon por tion kompensi. Do, plian fojon ni petas pardonon al la abonantoj. Ni memorigas, ke la abono validas por dek numeroj sen limo de tempo.

Okazis du kunvenoj en Parizo. Al ili estis invitataj junuloj el JEFO (franca branĉo de TEJO), al kiuj ni prezentis la celojn kaj historion de SAT. Ni ankaŭ pridiskutis la eventualan organizon de debato pri neŭtraleco-neŭtralismo, kiu ebligus klare komprenigi al la novuloj kial tiuj vortoj daŭre dividas la movadon. Ni tiuokaze provos kompreni kial pluraj klasbatalemaj junuloj aktivas ĉe la neŭtraluloj anstataŭ veni en SAT. Tiu ĉi debato verŝajne okazos ie en la pariza regiono dum la venonta lernojaro.

La unuan de Novembro, k-doj Lino kaj Vinko Markov ankaŭ partoprenis en radioelsendo animita de la JEFO-anoj kadre de pariza Liberecana Radio (Radio Libertaire). Tio konsistigis plian okazon por iom reklami pri SAT en junula kadro.

Ni tamen konfesu ke ĉio tio alportis absolute neniun plian membron al la asocio... Iom surpriza estas la fakto, ke nur sepdeko da nomoj troviĝas en la sliparo de la junulfakanoj. Tio signifas, ke la aliaj SAT-junuloj ne estas registritaj ĉar ili ne indikis sian naskiĝojaron. Do ĉiuj malpli ol 35-jaraj kamaradoj bonvolu anonci sin.

Ĉar la kongreso denove okazos antaŭ la fino de la ekzamenperiodo por la francaj studentoj (kiel por ĉiuj germanaj lernantoj kaj instruistoj, kaj verŝajne ankaŭ multaj aliaj…), neniu respondeculo povos ĉeesti en la kongreso por doni precizigojn aŭ ricevi kritikojn kaj sugestojn. Tio tamen ne devus esti tiel ĝena, ĉar nun eblas virtuale kunveni dank'al la modernaj komunikiloj, kiuj estas je la dispono de ĉiuj. Krome ekzistas ankaŭ kongresa raporto, kiu ebligas al nepartoprenintoj ricevi kelkajn eĥojn pri la diritaĵoj. Unuvorte, malgraŭ la foresto de la respondeculoj, nenio malebligas al la kongreso debati pri la fako, kiu ja estas organo de la Asocio.

Vinko Markov

Frakcioj

Ŝajnas ke ni devas ripeti la saman konstaton kiel lastjare ke niaj frakcioj ne tre aktivas. En Sennaciulo malofte aperas frakciaj informoj pri iliaj aktivecoj, kvankam ili disponas pri sia kolumno. La liberecana frakcio regule eldonas sian propran organon kaj la Sennaciista frakcio pli-malpli aktivas en la reto. La aliaj frakcioj ne donis al ni iajn informojn.

Kongresoj

La venontjara kongreso devus okazi en Slovakio (Bratislava aŭ en alia loko). Tiun ĉi kongreson organizos entrepreno de nia amiko Petro Chrdle, "Kava-Pech". Li jam tre sukcese organizis SAT-kongreson en Ĉeĥio (Karlovy Vary). Por la jaro 2005 ni ricevis eĉ du invitojn el Bulgario. Nia k-do Arturo Prent, PK-respondeculo pri la kongresoj, certe donos al ni pli detalajn informojn.

Konkludo

Jen la raporto de la Plenum-Komitato. Se vi havas iajn rimarkojn aŭ kritikojn, bonvolu prepari ilin por la kongreso, por ke ni povu kiel eble plej rapide pritrakti ĝin kaj aprobi.

La Plenum-Komitato de SAT

EN FREMDA LAND'

En fremda lando vagas mi
tutsola senkonsola.
Sed fremda land' ne estas ĝi,
patrio mia estas ĝi,
patri'amata pli.

Ĉar estas mi kosmopolit',
la tuta mondo estas
patrio mia. Stultigit'
nur blinde kredas je l'patri'
kaj mortas li por ĝi.

Samkiel por libera bird'
tutmond' patrio estas,
tiele por mi, tera id',
patrio estas tuta mond',
patrio tuta mond'.



Sed mia lando estas - Ter',
mi ĉiujn homojn amas.
Mi estas id' de l'Univers',
la tutan mondon amas mi,
ĝin amas pli kaj pli.

Ja venos baldaŭ tiu temp',
kiame proletaro
ekregos kun la sanprudent',
flirtados sole ruĝa flag'
kaj brilos hela tag'.

Ĥ. M. Ĥrima, "Poemo de l'plugisto"

Mia Couto (1)

LETERO AL PREZIDENTO BUSH

el la portugala tradukis *João José Santos*



Sinjoro Prezidento,

Mi estas verkisto el malriĉa nacio, lando kiu jam estis en via fi-listo. Milionoj da mozambikanoj malkonis kian malbonon ni faris al vi. Ni estis etaj kaj malriĉaj: kiun minacon ni povus konstitui? Nia masiv-detrua armilo estis finfine turnita kontraŭ ni: ĝi estis la malsato kaj la mizero.

Kelkaj el ni trovis stranga la kriterion kiu makulis nian nomon, dum aliajn naciojn komplezis via simpatio. Ekzemple, nia najbaro – tiu Sudafriko de rasapartigo – perfortis klarvide la homajn rajtojn. Dum jardekoj ni estis viktimoj de la agreso de tiu reĝimo. Sed la reĝimo de rasapartigo meritis de via flanko pli mildan agadon: la nomitan pozitivan envolviĝon. ANC (mozambika partio) estis ankaŭ en la fi-listo kiel terorista organizaĵo. Stranga kriterio kiu konsekvence igis ke, post jaroj, la talibanoj kaj eĉ Bin Laden estis nomitaj "freedom fighters" (porliberecaj luktantoj) fare de usonaj strategoj. (...)

Nu, mi, povra verkisto de povra lando, havis songôn. Tiel kiel Martin Luther King iam sonĝis ke Usono estis nacio de ĉiuj usonanoj. Nu, mi sonĝis ke mi ne estis homo sed lando. Ja lando kiu ne kapablis dormi pro tio ke mi vivis afliktata pro teruraj faktoj. Kaj tiu timego igis min postuli ion. Postulo rilata al vi, Kara Prezidento. Kaj mi postulis ke Usono ekdetruu sian masiv-detruan armilaron. Pro tiuj teruraj danĝeroj, mi postulis pli: ke la inspektistoj de Unuiĝintaj Nacioj estu sendotaj al via lando. Kiaj teruraj danĝeroj min alarmis? Kiajn timojn via lando al mi kaŭzis? Ne estis sonĝaĵoj, malfeliĉe. (...)

Ne maltrankvilu, sinjoro Prezidento. Al ni, etaj nacioj de ĉi mondo, ne venas la ideo postuli vian demision pro tiu apogo liverita de viaj sinsekvaj administracioj al ne malpli sinsekvaj tiranoj. La plej granda minaco kiu pezas sur Usono ne estas la aliulaj armilaroj, sed estas la mensog-universo kiu kreiĝis ĉirkaŭ viaj civitanoj. La danĝero ne estas la reĝimo de Saddam, nek alia reĝimo, sed la super-sento kiu ŝajnas animi vian regadon. Via ĉefa malamiko ne estas for, ĝi estas en Usono. Ĉi tiu milito nur povas esti venkota de la propraj usonanoj.

Mi ŝatus povi festi la faligon de Saddam Hussein, kaj festi kun ĉiuj usonanoj, sed sen virt-ŝajno, sen argumentoj por konsumo de mens-etuloj. Ĉar ni, kara Prezidanto Bush, la popoloj de la malgrandaj landoj, havas masiv-konstruan armilon: la pens-kapablon.

(1) Ĉi tiu teksto estas eldonita en diversaj portugaliaj gazetoj. Ĉi traduko estas farita surbaze de la etigita teksto aperinta en la revuo Escola Informação, n-ro 178, revuo publikigata de unu el la plej reprezentaj portugaliaj sindikatoj de instruistoj, kies siglo estas SPGL.

ETA NOTO PRI MIA COUTO

Mia Couto [mia koto (Por)] naskiĝis en 1955, en Cidade da Beira [sidad da bajra (Por)], Mozambiko. Lia naskiĝnomo estas António Emílio Leite Couto. La plumnomo Mia Couto venas de lia katamo. La verkisto ĉiam vivis en Mozambiko, kie faris siajn studojn, eĉ la universitatajn. Post la karier-starto kiel ĵurnalisto, li iĝis beletristo. Liaj verkoj, dotitaj de originala stilo, jam estas tradukitaj diverslingven: nederlanda, sveda, norvega, itala, franca kaj kastilia. Mia Couto dediĉiĝas ankaŭ al teatro kaj al biologio. (supra foto)

ETA NOTO PRI JOÃO JOSÉ SANTOS



Naskiĝis en Portugalio, Lisbono, en 1958, kie ĉiam loĝis. Licenciiĝis en Lingvoj k Literaturoj Portugala, Latina k Helena, diplomiĝis kiel profesia instruisto pri tiuj fakoj, kaj majstriĝas nun en latina beletro. Faras siajn studojn en la Beletra Fakultato de la Universitato de Lisbono. Profesie instruas en mezlernejo tiujn lingvojn k literaturojn. Instruas esperanton ekde 1985 en Portugalio, kie estas la fakdelegito de ILEI.

Unua de majo en Bruselo

La Antverpena stacidomo konstruita komence de la 20a jarcento kaj inaŭrigita en 1905 "suferas" jam dum kelkaj jaroj renovigon. 7 tagoj je 7, laboristoj laboregas por modernigi la stacidomon por ke la trafiklinio Parizo-Amsterdamo povu havi haltejon en, laŭ ĉiu Antverpenano, la plej bela stacidomo en la mondo.

Hodiaŭ neniu bruo de laboro aŭdeblas, neniu laboristo kuras rapidege de unu loko al alia. La laboristoj festas la 1-an de majo.

17 tagoj antaŭ nacia baloto por nova registaro, ĉiu politikisto el Belgio sentas sin ligita al la laboristoj. Eĉ la faŝismema Vlaams Blok alvokis la "laboristojn el tuta Flandrio" ĉar tio estas la absoluta limigo de ilia malsaniga naciisma penso, al kunveno en la urbo Aalst.

Jam matene mi aŭskultis la mieldolĉajn frazojn de la politkistoj el Antverpeno. "Ek de nun ĉio ŝanĝiĝos, kamaradoj"! La frazoj kaj ĉiam ripetataj mensogoj de la demagogoj igas min trista. La 1-a de majo ne estas la tago de la politikistoj. Kial ili ne por unu tago silentas kaj lasas la laboristojn el la tuta mondo, ĉar nur tio estas la limigo de la laborista "potenco", trankvile rememori pri la bataloj jam faritaj kaj la multaj bataloj farotaj.

Sur "Place Rouppe" en la koro de Bruselo, okazas "La festo de la laboro", organizita de FGTB-ABVV, la socialist-tendenca sindikato el Belgio. Jam pluraj jaroj k-do Van Damme zorgis ke Esperanto havu budon dum la festo.

Inter dekoj da aliaj budoj de multkulturaj organizoj, Esperanto havas kaj meritas sian lokon.

Kun amikina Stella De Weerd, mi serĉis la tendon en kiu troviĝas nia budo. Clementine Staquet kaj Claude Glady jam ordigis ĉion. Du amikoj de la neŭtrala movado jam disdonis flugfoliojn.

La bela suno kiu bonvenigis nin al Bruselo donis la eblon iom ĉirkaŭrigardi. Neimagebla mikspoto de kulturoj, lingvoj kaj koloroj ornamas la placon kaj straton kiu direktas al "Place Rouppe". La perfekta medio por paroli Esperanton.

Bedaŭrinde la pli ol 100 jaraĝa lingvo bezonas ĉiun tagon denove propagandon kaj informon pri ĝia ekzisto, ĉar daŭre maltro da homoj ekscias pri ĝia ekzisto.

Claude kiel ĉiam montras sin la plej kompetenta propagandisto de nia lingvo. Kaskadvorte li alparolas homojn kiuj montras intereson kaj Stella kiel kutime iras sur la strato, disdoni flugfoliojn. Mi, ankaŭ kiel kutime, devas formanĝi la fingrojn pro ĉagreno, ke mi ne kapablas paroli la francan, do preskaŭ ne povas alparoli iun ajn. Multe mi povis babili kun Guy Vanderputten pri SAT-aferoj. Eric Baert kiu intencis doni helpan manon ne povis fari multon pro veterŝanĝo. La suno malaperis malantaŭ dikaj nuboj plene de pluvo, pluvego eĉ, kiu forpelis ĉiujn vizitantojn de la evento. Pli ol 1 horon la vizitantaro iĝis najlita al seketa loko. La artistoj muzikantoj kantis antaŭ malplena placo kaj la nura aplaŭdo estas pluvego.

Inter ekpluvo, Stella kaj mi reiris al Antverpeno. Ĉu la 1-a de majo falis en la akvon? Fakte ne, tio ne eblas. Ni laboristoj havas nian batal- kaj festotagon. Ĉiujare denove la kapitalistoj devas rememori ke ni kuraĝas fari feran pugnon kontraŭ ilia potenco. Ili scias ke ni festas dum la 1-a de majo, sed ke ni daŭre batalas, dum la cetero de la jaro, por havi socialajn kaj egalajn rajtojn.

Jakvo

kaj en Berlino...

Ĉi-jare sufiĉe granda nombro de berlinaj esperantistoj (7-8) aperis ĉe la stando organizita de Maldekstra Forumo ĉe la majfesto sur Mariannenplatz, kiun aro de organizaĵoj kaj partioj aranĝas ĉiujare. Kompreneble ne ĉiuj ĉeestis dum la tuta kvinhora deĵorado kaj samtempe. Kiel dum la pasintaj jaroj ni disdonis flugfoliojn kaj faldfoliojn, kaj vendis kelkajn broŝurojn.

Pluraj aĉetis la broŝuron de Roland Schnell, kiu traktas la respeguliĝon de la bataloj dum la 1-a de majo 1929 en Berlino, kiu troviĝas en Metropoliteno de Varankin. La broŝuro enhavas informojn pri la historia fono de la eventoj mem, de la romano de Varankin, kaj eltiraĵon el la germana traduko de la romano, kiun Roland faris.

Oni demandas ankaŭ foje pri TTT-adresoj, kaj certe por iuj tia stando estas instigo serĉi informojn en la reto poste.

Kun amikaj salutoj de Gary

Strikoj kaj manifestacioj en Francio

Mi deziras honeste informi vin pri nuntempaj okazaĵoj en mia lando.
En Francio de pluraj semajnoj okazas fortaj strikoj por la pluvivigo de niaj socialaj pensioj. Unuetrafitaj de registara reformo, la ŝtatlaboristoj strikas kaj protestas jam de longa periodo (60 tagoj en Antilioj, 30 en Kontinenta Francio). Tio dependas de regionoj kaj lokaj cirkonstancoj.
La registaro deziras plilongigi la laborperiodon (kaj pensiokotizadon) al 42 jaroj (37,5 nuntempe). Junulo, kiu iom studis (aŭ serĉis laboron vane) devus labori ĝis la 70a jaraĝo. Krome por senhonte priŝteli nian monon ili intencas forpreni procentaĵon laŭ la mankantaj laborjaroj. La unika solvo por la bonpagitoj estos pagi privatan asekuron. Kial ne?
Estas malfacile diveni la estontecon. Tamen mi provos ĉi-tie. Miaj kolegoj estas forte engaĝitaj en la batalo. Mi havas la senton, ke ni iros ĝis la fino de la batalo sen rezigni antaŭe. Jam fikompromiso fare de sindikataĉo CFDT bankrotis kaj ties sindikatestroj nun estas en pereo.

Venontan dimanĉon okazos giganta manifestacio en Parizo. Kompreneble ili tiam eltrovos miraklan proponon por tromplogi nin. Pro nuntempaj stultaj vortoj, niaj ministroj perdis la avantaĝon.

La finvenko venos de kompleta ĝeneraligo de la striko al privatlaboristoj (kiujn la registaro sodomiis kelkajn jarojn antaŭe). Tiam la sekvonta rendevuo estos la 2a de junio, kiam aldoniĝos la transportlaboristoj.

En kazo de obstineco de la registaro ni iros al Ĝenerala Striko (tutprofesia striko). Ĉu la ĉefaj sindikatoj iros al tio? Ili iru, kaj la registaro manĝos fekaĵon!
Eble niaj alilandaj gekamaradoj povus diskonigi tiun informon eksteren.
Laŭdire en Aŭstrio okazas same.

Gerardo (tra la reto)

58-a kongreso de SAT-Amikaro

KONGRESO DE SURPRIZOJ

La organizantoj de la 58-a kongreso de SAT-Amikaro, okazinta en Le Cap d'Agde, en suda Francio, pensis ke ĝi estos jam sukcesa se partoprenos en ĝi 150-160 esperantistoj. Nu, entute aliĝis 203 el kiuj plejmulto el Francio, sed



OKK : Josée kaj Michel Lafosse kun parto el la OKK

Foto: H. Masson

ankaŭ el Belgio, Katalunio, Hispanio, Italio, Germanio... Ĉio okazis en bonaj kondiĉoj en tiea feria vilaĝo "Azureva" (unu el la 40 de Francio), dank'al la diskreta sed efika preparado kaj laboro de la Organiza Kongres-Komitato, kiujn gvidis Josée kaj Michel Lafosse kun helpo de aktivuloj de la franca asocio de fervojistoj por Esperanto (AFCE) kaj de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono kaj unuopaj esperantistoj.

La urbestraro de Agde konsentis ne nur pri afiŝado de publika franclingva prelego de la aŭtoro de "Langues sans frontière", Georges Kersaudy, pri "La komunikado en plivastigita eŭropa komunumo", sed ankaŭ pri senpaga disponigo de la plej bela el la salonegoj de ĝia Kongrespalaco. La neesperantista publiko estis bedaŭrinde minoritata. Estas menciinde ke partoprenis ankaŭ la direktoro de Azureva. Kritikoj kontraŭ Esperanto tamen audiĝis flanke de ĉeestanto... kiu nenion sciis antaŭe pri la lingvo.

Dum la pasinta agadperiodo, SAT-Amikaro perdis 9 fidelajn membrojn el kiuj ses pro morto, sed esence pro la malkresko de la nombro de novaj lernantoj de la perkorespondaj kursoj. Ne ankoraŭ efektiviĝis la projekto de nova revuo jam priparolita pasintjare, ne pro la manko de valoraj kunlaborantoj, sed pro la manko de libera kaj kapabla ĉefredaktanto. Tre surprizitaj estis la kongresanoj kiuj unuafoje vizitis la Libroservon de SAT-Amikaro : kuŝis centoj da libroj kaj artikloj sur 30 metroj da tabloj. Multe vendiĝis la plej nova libro de Raymond Gueguen eldonita de SAT-Amikaro sub la titolo "La langue internationale ou la recherche d'une langue commune" (La internacia lingvo au la serĉado de komuna lingvo), kun antaŭparolo de Jean-Luc Tortel.

Ne facile resumebla estas la programo de prelegoj kaj kunvenoj kiu okupas 3 paĝojn de la kongreslibreto. Granda parto el la kunvenoj koncernis la partoprenon de la SAT-movado (SAT kaj asocioj ĝin subtenantaj, i.a. SAT-Amikaro) en diversaj sociaj kaj politikaj manifestacioj: 1-a de majo, Eŭropa Sociala Forumo (ESF) okazonta en novembro, eŭropaj balotoj de 2004. Efektive, plifortiĝas kaj plivastiĝas la ideo prezenti liston de kandidatoj okaze de tiuj balotoj sub la nomo "Neŭtrala Federa Lingvo Esperanto". Almenaŭ ĝis nun, ĝi ricevis la subtenon de la fama sciencisto Albert Jacquard kaj de Georges Kersaudy. Pliaj detaloj estas riceveblaj de Christian Garino : <esperviv@hotmail.com> <mailto:esperviv@hotmail.com> aŭ legeblaj ĉe : <europesperanto.multimania.com>.

Koncerne la amasinformilan aŭ eksteran efikon de tiu kongreso, krom la afiŝoj, aperis bona artikolo en la gazeto "Midi-Libre". Fine de la kongreso, la direktoro de la vilaĝo Azureva de Cap d'Agde proponis ke oni planu por lia centro unusemajnan programon de Esperanto-instruado kiu cetere povos esti anoncita en la venonta 150-paĝa belega katalogo de Azureva.


Inter la belaj kaj ŝatataj eroj de tiu kongreso estis la teatraĵo "La krimo de



Parto el la impona libroservo kun ornamaĵoj pretigitaj de René Ballaguy

Foto: H. Masson

la strato de l'Ursin'" de Eugène Labiche, kiun ludis la Teatra Trupo de Tuluzo, kiun reĝisoras Arnaud Lagrange. Ĝoja etoso regis dum la dimanĉvespera plurlingva kantado de JoMo kiu vigle, petoleme kaj



JoMo plaĉis al ĉiuj, sen distingo de aĝo.

Foto: H. Masson

gaje prezentis en Esperanto kanzonojn en la rusa, ukraina, itala, hispana, jida, araba, japana, cigana, pola... Estas notinde ke la eldono de la jaro 2000 de la libro "Guinness" de la rekordoj registris lin pro kantado en 22 lingvoj. Ankaŭ tiu spektaklo havis pozitivan eksteran efikon, ĉar la persono kiu kontestis la valoron de Esperanto post la prelego de Georges Kersaudy agnoskis ke temas pri nekontesteble vivanta lingvo kaj ke li eraris. Vere bela surprizo por ĉiuj, eĉ por la "malamikoj" de la Internacia Lingvo ! Tiel bela ke pluraj kongresanoj esprimis la deziron revidi JoMon en la venontjara kongresurbo de SAT-Amikaro : La Roche-sur-Yon, kiu tiam celebros sian ducent-jariĝon.

Henri Masson

Viaj opinioj

IRAKO KAJ OKCIDENTO

Dum lastaj semajnoj oni jam malkonstruis en Irako multajn statuojn de Saddamo - ne necese Saddam-on mem. Tion verŝajne neniu farus. Kial?

Tra sia tuta ŝtata kariero, dum 34 jaroj, kiel kreaĵo de La Okcidento (LO), Saddamo faris nenion, kio difektus la interesojn de LO. Depremo de la iraka popolo, ok jarojn da milito (1980-88) kontraŭ najbara Irano post jarcentoj da paco, nun sen ia nacia pravigo je ambaŭ flankoj, okupo de Kuvajto sen bezono de io ajn en Kuvajto (1990). Tio fine "pravigis" al LO detrui Irakon (1991), disvastigi ĥaoson en la regionon kaj rabegi ties riĉaĵojn. Ekde A ĝis Z, LO ja armis ĉiujn partiojn kaj senhonte restas rigardi ili mortigi unuj la aliajn.

Do, malgraŭ tiaj afektaj teatraĵaj, stereotipaj parol-dualoj inter li kaj LO-aj amaskomunikiloj, kviete Saddamo ja restas praktike vasalo/ amiko de LO, kiu eventuale meritus statuon en Waŝingtono DC, ĉu ne?

Mi estas irakano kiu bone konas la psikon de Saddamo. Se li posedus ĉiajn potencojn de la ĉieloj, li nek uzus, nek eĉ dezirus uzi ilin kontraŭ LO! Ĉar psike li estas profunde hantata pro la sorĉa pompo de LO. Dum sia tuta politika kaj militisma kariero li strebadis imitadi, ekz-e Stalinon, Hitleron kaj ceterajn grandiozajn heroojn de LO. Li avidas pri LO-a agnosko de li kiel "egalulo" inter ili.

Laŭ tio, kion oni povas nomi 'kvieta interkonsento' inter li kaj LO - nome "Vi havu la seĝon kaj ni havu la landon", Saddamo restas memfida pri sia persona destino. LO-aj motivoj estas kredeblaj: Mortigi lin estus malbona aŭguro al ceteraj regantoj de regiono, kiuj pli/ malpli estas el la sama argilo kiel Saddamo. Lasi lin libera ekstere de LO-a protekto estus risko malkovri la detalojn de tiu 'kvieta interkonsento'. Oni taksas, ke li posedas $30 bilionojn investitajn plejparte en LO. Oni do povas kredi, ke CIA jam eskortis (aŭ baldaŭ - os) lin al sekureco ekstere de Irako. La administrantaro de S-ro Busho jam antaŭ la milito prononis "ekzilon" al li, eĉ kun 'promeso" sen persekuto. (Ĉu S-ro Busho estas internacia kortumo?!)

Cetere, s-ro Chirac nomas la tutan aferon de usona invado de Irako "granda eraro". Ĉu lia Francujo ankaŭ (nur ekzemplo pri ĝia internacia tiu-rilata konduto) "eraris", kiam ĝi ankaŭ armis Saddamon kaj Israelon, kaj eĉ iamaniere helpis Ruhulalla-Khumejni-on estri Iranon (por tuj renkonti Saddamon en la milit-kampoj)?!

En unu frazo, laŭ mi, LO ne interesiĝas pri paco por tiu regiono. LO eĉ timas pacon, kiu ebligus prosperon kaj certigus laŭleĝajn interesojn por ĉiuj partioj. Kion do opinias ge-samideanoj pri mia "optimista" impreso?!

Husejn Al-Amily
T./f +44(0)20-8842 4192
rp: hmalamily@hotmail.com

*****

«VIRINA TAGO - PIV»

Mi deziras reagi al du artikoloj, pri «8-a de Marto - niaj aktivulinoj» (Sennaciulo 1173), kaj "Ĉies voĉo" de Anne (Sennaciulo 1171). La unua estas suprenigo de virinoj kaj la dua estas malsuprenigo de ili. Tamen ambaŭ devenas de nia asocio.

Ĉiam kiam mi vidas onian gratulon al "Internacia Virina Tago", mi min demandas, kial ni ne havas "Internacian Flavulan Tagon" kaj gratulas la flavecon. Evidente ni ne agadas tiel, ĉar ĝi estas rasisma. Ni ne bezonas aparte gratuli homojn laŭ koloroj de iuj haŭtoj.

Pro mia SAT-TTT laboro (mi nun administras ĝin kun la sidejo), mi hazarde trovis, ke la redaktoro intencis aperigi mian foton kiel unu el virinaj aktivuloj de SAT ne informinte min. Tio tre ĝenis min, tamen mi sciis ke ĝi ne devenas de malbona intenco. Mi tuj petis al la redaktoro forigi mian foton, ĉar mi agadas nur kiel SAT-membro, ne kiel "japano", "flava homo", "nigrahara" aŭ "virino". Mia aktiveco ne rilatas al mia sekso. Tia karaktero estas nur hazarda, mi ne elektis ĝin, dume mi agas kiel SAT membro laŭ mia volo.

Nun, ni vidu historion de Internacia Virina Tago. Tio fontas el movado farita de virinoj por akiri ilian rajton de politika partopreno en Novjorko, Usono en 1908-09. Tio estas fakto, ke virinoj ankoraŭ ne akiris egalan respekton aŭ politikan forton en multe da okazo kaj loko senrilate siajn klasojn. Bedaŭrinde en nia asocio, tia sama fenomeno parte ekzistas lingve en PIV, ĝuste kiel Anne montris en S-ulo 1171.

Nuntempe esperantujo, inkluzive neŭtraluloj, ĉagreniĝas pro malmulto de junuloj. Kialoj estas diversaj, sed unu el la evidentaj kialoj, kiun mi povas indiki, estas parte tre malprogresema sinteno de sekso lingve. Kiam mi legis lerno-libron de esperanto, mi surpriziĝis pri la ekzemploj kiuj estas malegalemaj esprimoj pri virino (kaj viro). Kiam mi alparolis pri ĉi tiu temo kun junaj kaj novaj esperantaj amikoj, kiuj parolas japanlingve, mi eksciis, ke mi ne estas unika homo, kiu estas ĝenata pri ĉi tiu fenomeno. Ĝenerale, kaj dekomence, junuloj kiuj interesiĝas pri esperanto, precipe pri SAT, estas progresemaj. Ili jam kutimiĝas al egaleco de seksoj. "Lingva politika praveco" estas usondevena movado, sed tio estas ankaŭ atente akceptata de progresemaj NRO-oj ktp, je tiel nomataj "pli konsciaj lokoj". Nu, tiaj novesperantistoj renkontinte tiajn reakciajn fenomenojn pri sekso en Esperanto, malesperiĝas kaj malfidiĝas al esperantujo.

Mi mem estis unu el tiuj. Laŭ diro de mia juna konato, pro ĉi tiu fenomeno kelkaj el ties konatoj forlasis Esperanton. Tio tute ne surprizis nin, sed estas tre bedaŭrinda afero.

Do, se SAT bone profitus de tiu ĉi Internacia Virina Tago, kion ni povas fari estas ne ornami aŭ danki virinojn per belaj vortoj kaj fotoj. Oni emas pensi ke diskriminacioj ekzistas ne en ni sed en alia fora loko, sed diskriminacioj fakte ekzistas en ni mem, en nia laborejo, hejmo aŭ asocio.

Unua paŝo estus certe sincera reago kaj respondo al la alvoko de Anne. Mi ne kulpigas Zamenhof pro limoj de ties epoko. Ĉiuj, inkluzive mi mem, havas tian limon. Posteuloj trovas ĝin pli facile pro sia posteco. Sed mi kulpigas modernajn homojn kiuj senhezite elektis tiajn frazojn en PIV nuntempe. Mi ne povas akcepti ke tiaj frazoj estas elektataj por vortaro kun konsento de egalema kaj humanisma asocio.

Anstataŭ ornami la tagon de virino, mi proponas fiksrigardi la problemojn en nia asocio kaj ĉies propra ĉirkaŭaĵo. Sed precize dirinte, mi mem ne preferas pensadon por nur unu parto de la tuta homaro. En ĉi tiu epoko ni pensu pri egalaj rajtoj de ĉiuj seksoj kaj rasoj. Tio inkluzivas seksminoritatulojn ekzemple samseksulojn, transseksulojn, kaj ankaŭ virojn, kiuj suferas pro devigo "esti maĉo (forta)", altrudo farita de socio, kaj virinojn, kiuj ĉiam estas traktataj kiel virinoj anstataŭ kiel "homoj", kaj tiel plu.

Nunepoke, por SAT, "Internacia Tago de Ĉiuj Homoj" estus pli normala ol nura tago por gratuli virinojn.

Viola (Kanazawa, Japanio)

LA SEKSAJ MOROJ VARIAS LAŬ KULTUROJ

Jakvo Schram, kiu plenumas malpli ol la duonon de siaj devoj de membro

de Amnestio Internacia, akuzas min pri atenco kontraŭ la homaj rajtoj, ĉar mi pripensas, kiel la franca ŝtato estus povinta eviti la seksperforton, kies viktimo mi estis. Siaflanke Marthe Poher, kiu universale malamas ĉiujn virojn, suspektas min pri rasismo, ĉar mi diras, ke la seksaj moroj varias laŭ la kulturoj.

Fakte mia seksperfortiĝo estis nur la plej grava el la problemoj, kiujn mi havis en miaj rilatoj kun islamaj viroj. Estis multaj aliaj. Ekzemple, Arabo kutimis telefoni al mi je la dua horo de la nokto por proponi seksumadon. Senpruve mi suspektas mian marokan najbaron, ĉar:

- la telefoninto havis araban akĉenton
- li loĝis sufiĉe proksime de mi por ke mi lin tuj trovu elirante el mia loĝejo.

Dum lia familio feriis en Maroko, mia najbaro invitis min "por trinki kafon". Mi respondis: "Dankon, mi ne ŝatas kafon". La muro inter mia dormcambro kaj lia loĝejo estas maldika. Nokte mi aŭdis tra la muro porno-kasedon. Poste la familio revenis el Maroko. Tiam estis alia kasedo malantaŭ la muro: la alvoko de la muezino al la preĝo.

Jakvo skribis, ke li neniam havis problemojn kun Turkoj aŭ Marokanoj. Bone, sed Jakvo estas viro kaj edzo. La problemo kun islamaj viroj estas, ke ili ne povas toleri, ke virino vivu sole kaj ne nasku infanojn. Jam 3 islamaj viroj proponis al mi fari al mi infanon. Kompreneble, min gravediginte, ili tuj forkurus, lasante min sole eduki la bastardon. Sed laŭ pensmaniero de islama viro, estas pli bona sorto por virino naski bastardon aĝante 51 jarojn, ol tute ne havi filon.

Unu el la 3 islamaj viroj, kiuj proponis fari al mi infanon, estis mia alĝeria korespondanto. Ĉe tiu propono, li jam havis 4 gefilojn. Poste li havis kvinan, ĉar lia edzino estas tiom stulta, ke ŝi forgesas sian pilolon. Pro religiaj motivoj, li ne volas, ke ŝi abortu. Kompreneble, estas li kiu decidas pri tio.

Antaŭ jaroj li sendis al mi sciigilon pri sia edziĝo: "Sinjoro X invitas vin al sia edziĝo". Mi skribis al li, ke mi miras, ke la sciigilo ne sciigas la nomon de lia fianĉino. Li respondis: "Mia fianĉino havas siajn proprajn sciigilojn" kaj sendis ekzempleron: "Sinjoro Y invitas vin al la edziniĝo de sia fratino Naĝat". La nomo de la bofrato estis skribita pli grande, ol la nomo de la fianĉino. Do klare: islama geedziĝo estas la ceremonio, per kiu viro transdonas al alia viro sian proprietrajton pri iu virino.

Laŭ la alĝeria familia leĝaro :

- aŭ Alĝerianino estas edzino, kaj laŭleĝe devas obei sian edzon
- aŭ ŝi ne estas edzino, kaj nepre devas esti iu viro, sen kies permeso ŝi ne povas edziniĝi.

Ĉiu islamanino apartenas al iu viro. Do kiel kondutu islama viro kun Francino, kiu apartenas al neniu viro? Bedaŭrinde multaj alvenas en Francion sen tion scii. Tial mi volus, ke estu en ĉiu franca konsulejo informiloj en la loka lingvo pri francaj moroj. Kiam mi menciis francajn morojn, mi ne pensis pri la kutimo manĝi fromaĝon antaŭ la deserto, sed ĉefe pri la maniero, kiel viroj rilatas al virinoj. Devus esti en la francaj konsulejoj jenaj informiloj por la vizpetantoj: "atentu! En Francio estas tre grava krimo, punebla per multjara mallibero, seksumi kun virino sen ŝia konsento. Estas delikto nokte perturbi ies trankvilon, eĉ telefonante al sole dormanta virino por proponi seksumadon. Cetere, 50-jarulino tre verŝajne ne deziras, ke vi faru al ŝi infanon. Ankaŭ estas maldece meti manon sur pugon aŭ mamon de virino sen ŝia konsento, eĉ se ŝi videble ne surhavas mamzonon sub sia T-ĉemizo".

Bedaŭrinde tiaj informiloj ne ekzistas, ĉar francaj konsuloj estas tiel naivaj, kiel Jakvo Schram. Ili imagas, ke iliaj moroj estas universalaj, kaj ke nepre ĉiu viro en la mondo nature kondutas kiel ili.

Tial iu konsulo donis vizon al Turko por labori en la fromaĝejo de Bourg-en-Bresse sen lin averti, ke en Francio estas krimo seksumi kun virino sen ŝia permeso. La Turko vidis sur strato de Bourg-en-Bresse junulinon, kiu promenis sole, sen esti akompanata de patro, frato aŭ edzo : Nekredeble! La belulino apartenas al neniu". Do, ĉar tio atencis kontraŭ la honoro de neniu viro, li seksumis kun mi, eĉ sen pensi, ke li devus demandi pri mia konsento.

Kutime islama viro seksperfortas nur unu virinon : sian edzinon. Tion li faras kun la konsento de ŝia patro. Se li seksperfortus alian islaminon, la viro, al kiu ŝi apartenas, venĝus la honoron de sia familio. Sed se virino apartenas al neniu viro, seksumi kun ŝi ne estas peko.

Ĉar aĝante 12 jarojn mi estis viktimo de franca pedofilo, mi bone scias, ke ankaŭ Franco povas esti seksa krimulo. Sed ne ekzistas Franco, kiu ne scias, ke estas krimo seksumi kun virino sen ŝia konsento. Franca seksperfortinto, kiam oni lin kaptas, asertas, ke la viktimo konsentis. Tion asertis la 18 junuloj, kiuj kolektive seksperfortis 15-jarulinon. Franco tute bone scias, ke Francino rajtas vivi sole. La problemo estas, ke iuj opinias, ke virino sole vivanta certe konsentas seksumi kun ĉiu viro, kiu tion deziras. Islama viro ne demandas sin, ĉu la virino konsentas, ĉar la demando estas, ĉu konsentas la viro, al kiu ŝi apartenas. Se ŝi apartenas al neniu viro, ne estas demando.

El la du Turkoj, kiuj min seksperfortis, almenaŭ unu ne sciis, ke seksumi kun Francino, sen ŝia konsento estas krimo. Se li sciintus, eble la timo al la ĝendarmo lin detenintus. Sed li ne sciis kaj la krimo rezultis el lia nescio. Tial mi volas, ke oni informu la vizpetantojn pri la francaj moroj. Tio ne signifas, ke nepre ĉiu seksperforto okazanta en Francio rezultas el tia nescio. Sed tiel okazis tiu, kies viktimo mi estis.

Mi iam enkondukis en "Laŭte !" debaton pri seksperforto. Nur unu el la partoprenantoj skribis, ke estas normale, ke viro seksumu kun virino kiu klare diras "mi ne volas". Li estis la nura Afrikano, kiu partoprenis en la debato. Ĉu hazardo?

Anarkiistoj volas, ke mi iru manifestacii sur la stratoj de Bourg-en-Bresse por postuli, ke la tiea prefekto donu restadpermeson al ĉiu Turko aŭ Afrikano, kiu volas tie vivi. Ĉar mi ne faras, ili taksas min malamiko de la homaj rajtoj.

Jakvo volas abolicii la ŝtaton. Mi konsentas nur, se li diros al mi, kiu min protektu kontraŭ la seksavido de miaj islamaj kaj aliaj najbaroj.

Ĉar mi opinias, ke valoras diskonigi la ideojn de la anarkiistaj teoriistoj, mi estas tradukanta verkon pri Proudhon. Sed vere mi ne komprenas, kial la anarkiistaj legantoj de S-ulo, kiuj cetere estas tiom fieraj pri sia racieco, povas ne vidi la absurdecon de la argumento: "Ĉar mi ne estas krimulo, vi ne bezonas leĝojn por vin protekti kontraŭ krimuloj." Plian fojon mi konstatas, ke anarkiismo, pli ol alia ismo, allogas homojn ne sufiĉe maturajn por kompreni, ke vivo en socio necesigas regulojn, kaj sistemon por tiujn regulojn aplikigi.

Por ĉesigi la noktajn alvokojn de la Arabo, mi iris al la policejo de mia kvartalo. La simpla policisto, kiu min akceptis, diris, ke nur inspektoro povas registri mian plendon. Do mi petu rendevuon kun inspektoro, kaj venu al tiu rendevuo kun mia respondilo. Mi revenis hejmen sen rendevuo. Mi atendis la venontan alvokon de la Arabo kaj diris al li "Mi hodiaŭ plendis al la polico. Se vi denove plagos min, vi havos problemojn". Li neniam plu alvokis. Do estas vero, ke efektive mi ne plendis. Sed estas vero ankaŭ, ke mia problemo solviĝis nur, ĉar efektive estas policejo en mia kvartalo.

Enŝlosi seksajn krimulojn en frenezulejoj ne estas la solvo. Mi mem estis tie enŝlosita, kaj mi malbone vidas la diferencon inter malliberejo kaj ejo, kie oni min ligis al mia lito. Tamen estas diferenco : laŭleĝe krimulo rajtas

en malliberejo unu horon da promenado ĉiutage. Tion mi ne rajtis en la psikiatrejo de Clermont-Ferrand. Ĉu estas pli bone por niaj rusaj kamaradoj esti enŝlositaj en frenezulejo, ol en malliberejo? Kiun oni malliberigu : ĉu Turkon, kiu ne sciis, ke seksumi kun Francino sen ŝia permeso estas krimo; ĉu la Francinon, kiu freneziĝis pro lia seksperforto?
Pri la maniero, kiel diktatoroj riskas reagi al Esperanto, mi konsilas al Jakvo legi la verkon de Ulrich Lins : La Danĝera lingvo.
Nun mi finas tiun ĉi rebaton al Jakvo kaj ekpreparas la venontan kunvenon de mia grupo de Amnestio Internacia. Interalie ni petas de la justico kondamni homojn, kiuj torturis aŭ murdis infanojn. Se Jakvo ne konsentas kun tiu agado, li eksiĝu el Amnestio Internacia.

Jacqueline Lépeix

SATEH SAT EN HISPANIO

Naskiĝis grupo SAT-en-Hispanio.

Kiel vi scias, ĉar jam aperis informoj en Sennaciulo, dum la lasta kongreso de SAT en Alikanto, pluraj ĉeestantoj venantaj el Hispanujo kunvenis por diskuti la staton de la laborista Esperanto-movado en tiu ĉi lando. Ni konstatis la neceson kaj la oportunon de LEAo en Hispanio, tio estas, de asocio kiu agu nome de SAT en tiu lando, propagandu Esperanton en la hispana laborista medio kaj varbu por SAT inter la hispanaj esperantistoj. Sed ni ankaŭ alvenis al la konkludo ke la jam ekzistanta hispana LEAo, HALE, ne plenumas nuntempe tiun ĉi celon, ĉar ĝi sin okupas ĉefe pri polemikoj kontraŭ SAT mem kaj kun aliaj kamaradoj, ĉefe per la paĝoj de sia bulteno "Kajeroj el la Sudo". Konstatinte la malfacilon ŝanĝi tiun ĉi bedaŭrindan situacion, grupo da samideanoj decidis formi novan organizitan strukturon celantan kunordigi la personojn loĝantajn en Hispanujo, kiuj membras en aŭ sin sentas proksimaj al SAT. La nomo de la grupo estas simple SAT-en-Hispanio (SATEH), kvankam en niaj eksteraj agadoj en hispanlingvaj medioj ni decidis uzi pli "memeksplikan" nomon "Asociación Izquierda y Esperanto SATEH" (asocio Maldekstro kaj Esperanto).

La celoj de SAT-en-Hispanio estos la ĵus menciitaj: informado pri Esperanto en laboristaj medioj, kunordigado de agadoj en medioj proksimaj al la ideoj de SAT, apogo al tiu ĉi organizaĵo inter la hispana esperantistaro.

Ni komencis informi aliajn hispanajn samideanojn, substrekante ke en SAT-en-Hispanio povas membri personoj kiuj sentu sin proksimaj al la ideoj de SAT, ne estante membroj de tiu ĉi organizo.

Ni ankaŭ deziras esprimi ke la organizaĵo tute konformas al la sennacieca karaktero de SAT. La rilato al Hispanio havas nur praktikan valoron, ĉar ĝi taŭgos por kunordigi agadojn en tiu ĉi regno. Ĝi estas malferma al la partopreno de ĉiuj personoj kiuj deziros kunlabori, sendepende de la nacieco: ne gravos ĉu ili ne estas hispanoj, aŭ ne sentas sin tiaj.

Krome, konstateblas ke la grupo estos malferma al ĉiuj ideologioj ĝenerale troviĝantaj en la sino de SAT, kaj al ĉiuj progresemaj ideoj. Fakte, pluraj membroj de la kolektivumo agadas en la diversaj frakcioj nun ekzistantaj en SAT. Do, ni substrekas ke SAT-en-Hispanio ne estos la medio por kvereli inter ni, sed por kunlabori cele al la progreso de la tutmonda laboristaro, almenaŭ per la fortoj kiujn ni havos.

Fine, ni estas malfermaj al la kunlaboro kun la ceteraj esperantistaj asocioj jam ekzistantaj en Hispanujo kaj aliloke, en ĉio kio estas komuna al ni.

En decembro de pasinta jaro ni aprobis la statuton kaj elektis provizoran estraron, ĝis la momento kiam okazos Ĝenerala Asembleo, probable en julio de tiu ĉi jaro. La estraro konsistas el Manolo Parra kiel prezidanto, Toño del Barrio kiel sekretario kaj Pedro Hernández kiel kasisto. La statuto estis antaŭnelonge aprobita de la hispana registaro, per kio ĉiuj leĝaj aferoj estas jam solvitaj, kaj ni nun laboras super la organizaj komencaj taskoj.

Ni komencis jam agadi, per la partopreno en kampanjoj kiel tiu kontraŭ la apogo de la hispana registaro en la milito en Irako aŭ kontraŭ la agado de la hispanaj kaj galegaj aŭtoritatoj rilate la katastrofon de la petrolŝipo "Prestige". Ni ankaŭ ekrilatis kun progresemaj movadoj, por informi pri nia ekzisto kaj niaj celoj. Rilate la eksteran informadon, ni eldonis informan flugfolion kaj ni konstruis propran retpaĝon, kiun vi povas jam viziti ĉe la adreso <http:satenhispanio.eresmas.com>.

Se vi deziras pliajn informojn, vi povas skribi al nia adreso: Poŝtokesto (apartado de correos) numero 8537, ES-28080 Madrid, aŭ al nia reta adreso, aŭ vi povas kontakti la antaŭan aŭ la novan perantojn de SAT en Hispanio, Marteno Bustín kaj Pedro A. Hernández, kies adresoj troveblas en antaŭaj numeroj de Sennaciulo.

Ni intencas labori en la antaŭenigo de la progresemaj ideoj en la Esperanto-movado kaj de Esperanto en la progresemaj medioj kaj ni esperas esti kapablaj disvolvi taŭgajn agadojn en tiu direkto. Ni plu informos vin pri nia agado kaj bonvenigas ĉiujn viajn ideojn kaj iniciatojn.

Toño del Barrio



TAGA VIVO
Redaktas: Gerardo Rollin
88 str. Victor Hugo
FR-37400 AMBOISE
<a.reto@france-association.com>
Kompilo en TTT :
http://www.creaweb.fr/a.reto
Rubriko: "Forumoj"

MI MORTOS SEN DIPLOMO..

Angela eraris!

Legante la rubrikon «Taga Vivo» mi decidis reagi. Ĉiam estas triste, kiam oni legas pri juna homo, kiu mortas pro nekuracebla malsano, en la kazo de la amikino de Astrid, kancero.

Ni vivas kaj ĉiuj, riĉaj kaj malriĉaj mortos, jen la sola demokrata afero, kiu okazas en nia vivo. Inter naskiĝo kaj morto ni devas fari elektojn kiuj zorgas, ke nia vivo ne nur estas kiel eble plej agrabla sed ankaŭ fruktodona, kvankam per ĉi tiu diro mi jam plene povas maltrafi la celon. Kio estas agrabla kaj kio estas fruktodona ?

Ĉu ni ĉiuj, kiel Angela, ne havas de tempo la senton, ke ni plene malsukcesis en nia vivo? Vi ne? Nu, mi jes, kaj pli ofte ol mi mem deziras tion.

Mi havas ĉion en la vivo, kion homoj povas deziri. Mi havas inteligentan kaj bonegan edzinon, filinon kiu bone studas kaj laŭ mia scio estas tute feliĉa kun tio kion ŝi havas. Mi manĝas 3 fojojn tage, posedas propran domon, eĉ ne plu ŝuldas monereton al la bankoj kaj tamen …

Fakte la problemo pligrandiĝis, kiam mi eklernis Esperanton. Ĝis tiam mi laboris en medio de laboristoj, kiuj precipe diskutis pri piedpilko kaj aliaj sportoj, kiujn oni povas rigardi en televido kun granda biero en la mano. Arto, literaturo, klasika muziko, eĉ politikaj konceptoj estas aferoj pri kiuj neniu diskutis. Pli kaj pli mi havis la senton ke mi kulpis, ke mi ne plu kapablis "paroli" kun la kolegoj. Mi fakte ne plu volis nek povis akcepti, ke la plejmulto faris nenion por tiri sin el la plebana pensmaniero. Ĉi tiu intelekta paralizo inter la kolegoj, kiujn mi havis, povis kaŭzi ke mi sentis min nekredeble malbone. Eĉ pli, mi havis la senton, ke mi estis malsukcesinto en mia sociala vivo.

Kiam mi eklernis Esperanton mi eniris alian mondon. Pro iu hazardo mi havis jam ekde la komenco kelkajn intelektulojn esperantistojn, kiuj vizitis min. Tre intelekta kaj inteligenta virino el Ĉinio, profesoro el Brazilio, profesoro el Hungario, denove alia profesoro el Brazilio, doktoro el Benino ktp. Mi fakte transiris pere de Esperanto abismon inter diversaj malsamaj intelektaj klasoj. Mi jam iom spertis tion, kiam mi edziĝis kun mia edzino kiu, havante mem kelkajn universitatajn diplomojn, precipe havas geamikojn kiuj estas universitatuloj. Mi, kiel vi scias sekvis lernejon ĝis mia 14a jaraĝo, ne povas skribi sen eraroj kaj havas neniun diplomon. Jes mi estas afabla (laŭ mi) sed ĉu tio estas merito?

Mi absolute ne havas kompleksojn aŭ sentas min malsupera al iu ajn (ĉu pro stulteco?). Mi povas paroli kun proleto kaj reĝo kaj iam eĉ povis esti sindikatestro, kio signifas ke, se mi akceptus la postenon mi devus diskuti kun la reganta klaso de mia lando. Feliĉe mi ne estis sufiĉe koruptema, kaj ne volis akcepti la postenon bone pagitan.

Kiel dirite mi estas feliĉa kaj havas ĉion, kion la koro povas postuli. Mi pensas, ke mi eĉ ne timas la morton. Kion mi timas estas la pokaj horoj antaŭ la morto. Imagu, ke mi kiel Angela, konscie mortos… Mi timas, ke mi tiam mortos malfeliĉa, malkontenta kaj malĝoja. Mi mortos sen diplomo kaj tio ege ĝenas min.

Kiel ofte mi jam spertis, ke diskutante en forumo kun homoj, (eĉ en esperantujo mi spertis tion), kaj ke la antagonisto ekscias ke mi estas sendiploma persono. Ĉu vi scias, kion signifas kiam oni diras " O, vi estas nur laboristo, vi ne havas diplomon. Do kial mi, profesoro (mem serĉu la nomon) diskutas kun vi"? , kaj ke li turnas la dorson al vi.

Jes mi scias ke tiu homo estas fekaĵo kaj tamen daŭre oni kaptas min. Mi finas la diskuton kaj foriras.

Mi komprenas Angela-n, sed samtempe mi scias, ke ŝi erare pensis, ke ŝi maltrafis ion, ke certe ŝi ne mistrafis la vivon.

Mi havas kelkajn valorojn en mia vivo, kiujn mi kun mia plena forto defendas. Mi pensas ke bona mondo povas ekzisti nur kiam ĉiuj homoj vivos sociale/socialiste. Mi mem estas radikala socialisto sen esti fundamentisto. La plej altaj valoroj por la homoj estas libereco laŭ mi, sed libereco sen socialismo ne eblas (evidente mi ne parolas pri politikaj partioj, kiuj misuzas la vorton Socialismo). Nun jam de pluraj jaroj mi defendas disvastigadon kaj subtenadon de lingvo, kiu estas libere elektebla de ĉiuj.

Mi iom timas la homojn, kiuj volas altrudi esperanton al la tuta mondo, kiuj parolas pri fina venko, kaj kiuj kreas asocion laŭ nacia strukturo. Sed mi iĝis dum la jaroj malmola, kaj ekstrem-tolerema al ĉiuj konceptoj kaj ideoj. Do finfine mi ne plu koleras, kiam iu vivas kontraŭ aŭ malsame ol estas miaj preferataj konceptoj kaj ideoj.

Ni vivas sur tero kune kun pli ol 6 miliardoj da homoj. Por ĉiuj devas esti loko sur nia globo, kaj laŭ mia filozofio, ĉiuj devas havi la samajn rajtojn, devojn kaj oportunojn. Ĉiuj rajtas krei sian propran esperantoklubon por doni simplan ekzemplon, sian propran asocion, eĉ krei sian propran universalan lingvon. Mi pensas, ke faŝismo estas malbona kaj socialismo bona. Sed sciu, ke de tempo iu diras, ke mankas al mi diplomo, do mi scias nenion. Mi posedas bibliotekon kun pli ol 900 libroj, kiujn mi entute legis. De la plej renomaj filozofoj kaj plej konataj verkistoj. Pri humanismo, politiko kaj filozofio mi legis ĉion kaj jes daŭre legas multon. Mi havas amikojn en Japanio, Brazilio Benino. Mi kapablas paroli strangan lingvon kaj komunikas en ĝi kun homoj el la tuta mondo.

Kaj tamen mi timas la tagon, kiam mi ekscios, ke miaj tagoj estas kalkulataj. Mi mortos sen diplomo. Por mi tio estas terura.

La tutan verkaron de J.P. Sartre mi legis kaj mi estis preskaŭ adepto de la ekzistencialismo. Nun mi kuraĝas diri, ke Sartre eraris. Ni ne ĉiam regas plene nian vivon. Eksteraj cirkonstancoj influegas nian vivon, ĉe mi eĉ tiel, ke mi mortos sen diplomo.

Mi prefere ne pensas pri tio, ĉar tiam, miaj tri manĝoj ĉiutagaj kaj ĉiuj aliaj riĉaĵoj kiujn mi havas perdos sian signifon.

Angela eraris, sed mi komprenas ŝin.

Jakvo



76-a SAT-KONGRESO

ĈAŬDEFONO

12-19 Julio 2003

OKK : David Buhlmann (30984), Francisko Degoul (32785), Perla Martinelli (35546), Dieter Rooke (35571), Giorgio Silfer. Ekstera pri librotenado : Sonja Brun.

Adreso : 76-a SAT-Kongreso, ĉe KCE, cp 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, (Svislando). Rete: <esperanto.kce@esperantio.net>

Tel/fakso : +41.32.9267407.

KONGRESKOTIZOJ

Kongreskotizoj :

	Post la 31.05.2003
SAT-membro	85 €
SAT-geedzoj (se ambaŭ SAT-anoj)	150 €
SAT-junul(in)o (ĝis 25 j)	58 €
Gasto	100 €
Gasto junul(in)o	65 €

Infanoj ĝis 15 j. ne pagas la kotizon.

La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI ĝuas 30 procentan rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI) kaj de ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko, Usono) ĝuas 50% rabaton.


La petojn pri vizo por Svislando oni ne plu povas trakti.

Por profiti la SAT-tarifojn sufiĉas aliĝi al SAT por 2003. La kongreskotizo kovras la kongresan programon kaj aneksaĵojn (dokumentujon, ktp).

ALIĜINTOJ AL LA 76a SAT-KONGRESO,
je la Unua de Majo 2003

1. ARI MARTINELLI Perla; 2. AROLOVIĈ Natalia; 3. BALLAGUY René; 4. BANASZEK Evelyne; 5. BANNIER Jacques; 6. BARBERO Simone; 7. BARKOVIĆ Krešimir, 8. BELENJUK Galina; 9. BENINCASA Simona; 10. BERNARD Francis; 11. BERNARD s-ino; 12. BERNARD Simonne; 13. BORDES FERRER Santiago; 14. BOURLOT Carlo; 15. BUHLMANN David; 16. BUSTIN Marteno; 17. BUSTIN s-ino; 18. CABRAFIGA Monserrat; 19. CAPELLA Alberto; 20. CAPOCCIA Daniela; 21. CARDENAS CAPIRO Maria Julia; 22. CHASSARD-CAUBEL Renata; 23. CIALINI Fabio; 24. CONDE REY Marie-France; 25. DE CLERCK René; 26. DEGOUL François; 27. DE WEERD Stella; 28. DUC GONINAZ Arlette; 29. DUC GONINAZ Michel;
30. DUMONT Charles; 31. DURAND Daniel; 32. ELIASSON Jòn; 33. EMANUELSSON Agneta; 34. ENDERBY Dorothy; 35. ENDERBY Kep; 36. FELSZEGHY Judit; 37. GACOND Claude; 38. GARINO Kristian; 39. GEHT Grigorij; 40. GENTE André; 41. GENTE Hélène; 42. GEORGIEVA Reni; 43. GONĈAROV Anatolo; 44. GRIMAUD Jean; 45. GROSJEAN Mireille; 46. GUIGUES Antoinette; 47. HAMMAMBERG Jarl; 48. HARDY Roger; 49. HOEIJENBOS Kees; 50. HOEK. VAN DEN Luc; 51. HOLEVIĈ Aleksandar; 52. HOLEVIĈ Nelly; 53. HOLLINGER Max; 54. JONSSON Grétar; 55. KAISER Dorotea; 56. KAISER Hans-Georg; 57. KARATZAFERIS Nicolas; 58. KARNER Klaus; 59. KEABLE Stan; 60. KESSOUS Djémil; 61. KESSOUS Michelle; 62. KOJO AMISSAH Stephen; 63. KWANTES Cornelia; 64. KWANTES Nico; 65. KWANTES Rob; 66. KWASI MENSAH Paul; 67. LASZAY Anna; 68. LEDON Gilbert-René; 69. LEDON Symilde; 70. LUTERMANO Vilhelmo; 71. LYNN Ronald; 72. MAĜAROVA Ivaniŝka; 73. MAKAVEEVA Milena; 74. MARCANTI Anne; 75. MICHAUD Gisèle; 76. MICKLE Gary; 77. MONIER Edmond; 78. MONIER s-ino; 79. MONTAGNER Andrea; 80. MORIN Jacques; 81. MUHLEMANN Sonia; 82. NEMERE István; 83. NEMERE Ilona; 84. NILSSON Bertil; 85. NUÑEZ HERNANDEZ Mayra; 86. OPULSKIENE Gražina; 87. PEPIN Claude; 88. PERSSON Pelle; 89. PETROVA MITEVA Cvetanka; 90. PONTNAU Robert; 91. POUX Jacqueline; 92. PRENT Arturo; 93. PRENT Mary; 94. RALALARISOA Lala Justine; 95. RIBAS Antoine; 96. RIBAS Marie; 97. ROOKE Dieter; 98. SALGUERO José Maria; 99. SALGUERO CIDONCHA Carmen; 100. SARRUT Robert; 101. SCHNELLER Richard; 102. SCHRAM Jakvo; 103. SILFER Giorgio; 104. STOJANOVA Ivanka; 105. STOJLOVA Zlatka; 106. STUPPING Martin; 107. SUAREZ Manuel; 108. TAHIRA Masako; 109. TODOROV Jordan; 110. TOUBALE Franciska; 111. TRIFONCHOVSKI Ljubomir; 112. VARGAS GUTIERREZ Eduardo; 113. VIDAL Madeleine; 114. VILETTE Suzanne; 115. VIOLA Ando Murasaki; 116. VOHLA Frank; 117. WEIDMANN Dietrich; 118. WEIDMANN Nelida; 119. WESTERMAYER Manfred; 120. ZELAZNY Walter.

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.
Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,27 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :
70 € + 9 € (reg. afranko).
la menditajn librojn.

HELPO AL LA ASOCIO

En Germanio (€) Landmann 150,00 ; Breuninger 25,00 ; Knötzsch 20,00 ; Grupp 10,00 ; Scherm 50,00 ;
En Svedio (SEK) P. Persson 330,00 ; P. Persson memore al Malte Gahlin 200,00 ; SLEA 1000,00;
En Francio (€) anonime por Internet 100,00 ; anonime por nepagipovulo 50,00 ;
En Nederlando (€) A. Zwartepoorte 5,00 ;

POR LA NOVA KOMPUTILO

Anonime 50 € ; O. Masseron 65,00 € ; Lentaigne 101,11 €; J. Schram 25,00 €;

NEKROLOGO

La 11-an de aprilo 2003, forpasis en Valence (FR), 85-jara, nia k-dino

Madeleine TOURTOIS
(matr. 35.248)

Ni kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

*****

La 29-an de aprilo 2003 mortis en Haninge (SE) nia malnova kaj fidela membro, kamarado

Malte GAHLIN
(matr. 23.161)

Ni kondolencas al la familianoj kaj la gekamaradoj el SLEA.

*****

En Rognes (FR) mortis la 21.02.2003, 91-jara, nia malnova membro, k-do

François GARRIGUE
(matr. 29.924)

Niaj pensoj iras al la familianoj kaj geamikoj.

NOVALIĜOJ

35.609	Ramanitra Henri, V.X. 45 Haute-Ville, Antsahatsiroa, MG-101 Antananarivo, Malagasio
35.610	Rakotoharimihaja Emilien-Joelson, CEG, MG-Soavinandriana-Itasy, Malagasio
35.611	Nasolo, BP 33, MG-615 Mahabo, Malagasio
35.612	Randriamanga Miakabola, Lot IV T 9B Tsaramasay, MG-101 Antananarivo, Malagasio.
35.6013	Fidilalao Firaisana Henriel, Lot IPB 72 D Bemasoandro CP, MG-102 Itaosy, Malagasio.
35.614	Ramanandraibe Sylviane, Lot IPB 72 D Bemasoandro CP, MG-102 Itaosy, Malagasio
35.615	Andriamanohisoa Serge Richard, F.L.M. Vinaninkarena, MG-111 Antsirabe, Malagasio.
35.616	Rafanomezantsoa Falimanana, Lot 7 Bis Manakasikely, MG-116 Manjakandriana, Malagasio.
35.617	Randriarimanana Ando, Lot II C 72 FD Manjakaray Tana, MG-101 Antananarivo, Malagasio.
35.618	Ravoniarimanana Halianinomo, Lot II C 94 ADE Manjakaray, MG-101 Antananarivo, Malagasio.
35.619	Eakamamptonona Honora kajo H., Lot IB 120 Andoharanofotsy, MG-102 Antananarivo, Malagasio.
35.620	Andrianabela Voahangy H., Cité Universitaire Ankatso II bloc 31/1, MG-Antananarivo, Malagasio.
35.621	Fisahn Stefan, Dornbuschweg 37, DE-70191 Stuttgart, Germanio.
35.622	Garrido de Gomez Martirio, Turo de l'Home n° 10, ES-08105 Sant Fost de Campsentelles (barcelona), Hispanio.

76-A SAT-KONGRESO EN ĈAŬDEFONO

Nun estas vere la lasta momento por decidiĝi. Ĉu vi ŝatas vian asocion? Ĉu ĝia sorto gravas por vi? Se la respondo estas JES, tiam nepre venu al la kongreso. En la kongreso ĉiuj membroj decidas pri sia asocio. La sorto de SAT estas en la manoj de SAT-anoj. Krome vi pasigos tre agrablan semajnon kun riĉa kultura kaj distra programo!

SATEB

Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio



JARKON-FERENCO

SATEB-Kongreso: vendredo 16 -a de majo ĝis dimanĉo 18 -a de majo.

Post bona vespermaĝo, okazis dum la unua tago de la Kongreso la interkona vespero, sub gvidado de Prezidantino de SATEB, Perlo Simons kaj sekretariino Anne Johnson.

La amikoj de SATEB kun plezuro bonvenigis ĉi-jare kelkajn eksterlandajn gastojn, Djemil Kessous, Aleksander Korĵenkov, Gary Mickle kaj Jakvo Schram, kiuj la unuan vesperon plidaŭrigis la interkonon en Brita "pub" (tipa trinkejo).

Sabate, la respondeculoj de la "Wedgwood Memorial College" surtabligis, kiel kutime, bonege preparitan matenmanĝon. Certe la esperantistoj, kiuj iam vizitis la Kolegion, scias ke ĉiuj manĝoj estas zorge preparitaj kaj bongustaj. Do la estraro de SATEB certe pri ĉi tiu afero neniam devas fari al si zorgojn. Same la dormĉambroj kaj kunvenejoj montras pro pureco kaj aspekto al la gastoj ke ili estas bonvenaj, sed tio estas same por ĉiuj aranĝoj okazantaj en Barlastono. Malgraŭ la belega regiono, la verda parko kie abundas arboj kaj plantoj diverspecaj, la plejmulto de la partoprenantoj sidis vekaj kaj atentaj je la 09:30 horo en la granda salono por partopreni en la jarkunsido. Kelkaj komencantoj partoprenis en la lingva kurso kiu okazis samtempe kun la laborkunsidoj kaj prelegoj.

Perlo Simons malfermis la kunsidon kaj unue petis minuton da silento rememore al k-doj kiuj forpasis.

Ŝi afable gratulis Arturo Prent kiu prenis respondecon en la nova internacia P.K. de SAT kaj Jakvo Schram la novan prezidanton de la P.K. de SAT. Ŝi deziris fruktodonan laboron al la P.K. de SAT. Poste ŝi laŭtlegis la pardonpetojn de k-doj kiuj ne povis ĉeesti.

El la nomo de la P.K. de SAT, Jakvo deziris al la Kongreso fruktodonajn kunsidojn. Li substrekis la gravecon de la LEA-oj en la sino de SAT. Precipe grava estas ke en SATEB, kiel en la plejmulto de LEA-oj, la koro de la k-doj batas ĉe la maldekstra flanko, la flanko en kiu SAT agadas kaj batalas por havi pli socialan mondon.

Kvankam la jarkunveno precipe devas pritrakti la agadojn de SATEB, oni tamen kun granda atento pritraktis kelkajn erojn el ekster propra agadkampo, kiel interalie la sorto de la rusaj amikoj de la "Feliĉuloj". Anne Johnson volis scii ĉu ili daŭre estas en malliberejo kaj ĉu ili ricevas subtenon de iu flanko. Montriĝis ke necesas kontaktigi pri ili denove nian k-don Gudskov en Moskvo, kiu certe povas doni freŝdatan informon.

Unu post alia, oni pritraktis ĉiujn punktojn kiuj estas gravaj por la funkciado de la asocio. Arturo Prent prezentis kiel kasisto la financan sanstaton de SATEB. Kvankam ne ekzistas financaj problemoj, la veno de novaj membroj certe helpos al la funkciado de SATEB, ne nur finance.

Okulfrapas ke la anoj de SATEB, ne timas preni respondecon kiam rilatas agadi kaj labori.

Ĉiu aktivulo povis klare montri la laboron kiun li plenumis dum la lasta jaro.

Oni devas remi per remiloj kiujn oni havas, estas populara diro. Nu en SATEB oni certe faras tion. Eĉ pli, malgraŭ la "ŝajna" malforto, la asocio havas planojn kaj dezirojn kaj ankaŭ agadas por efektivigi ilin.

Estis reelektita kiel Prezidanto de SATEB, Perlo Simons, kiel sekretario Anne Johnson, kiel Kasisto Arturo Prent. Respondeculo en la Ĝenerala Konsilantaro de SAT, Ron Lynn kaj kiel estrarano Grete Gertner.

Mi nur faris de flanke kelkajn notojn kaj tial ne povas doni raporton pri ĉio kio okazis, pri ĉiu tasko kiun iu plenumas (os), sed kion mi ja povas diri estas ke SATEB estas en manoj de homoj kiuj serioze laboras.

Gastpreleganto dum la semajnfino estis Gary Mickle, kiu faris tre interesan prelegon pri "Novedekstrismo kaj Naciismo". Diskuto pri la prelego ne povis okazi ĉar la informo kiun Gary devis doni pri la temo forrabis la tempon antaŭviditan por la diskuto.

Posttagmeze, Ken Keable prelegis angle pri " History of Esperanto en The labour Movement". La prelego okazis en la angla por ke la komencantoj komprenu la gravecon de SATEB en la laborista movado.

Samtempe Paul Hewitt montris al interesiĝantoj la paĝojn de Laborstart < http://www.labourstart.org/eo/> kaj la tre gravajn paĝojn de la "Libera enciklopedio Vikipedio" < http://eo.wikipedia.org/ >. Ambaŭ paĝoj kiuj montras ke Esperanto povas funkcii en la ĉiutaga vivo kaj kiel lingvo plene uzebla en nia sociala kaj klasbatalo.

Arturo Prent prezentis dum diskutrondo SAT kaj la laboron kiun li faras kiel peranto por alvoki novulojn al SAT.

Jakvo faris alvokon al ĉiuj membroj de SATEB, helpi k-don Prent en la laboro. Necesas substreki ke varbi novajn membrojn al SAT ne estas tasko nur por la perantoj sed por ĉiuj membroj de SAT. Ni ĉiuj devas klopodi konvinki amikojn el sindikatoj, politikaj

partioj, socialismemaj kaj progresemaj, evidente ankaŭ membrojn de NRO-oj lerni Esperanton, sed ankaŭ uzadi ĝin dum sia laboro cele al pli humana mondo.

Dum debato iĝis klare ke la laboro de SAT devas esti plurloke. Ken, unu el la fratoj Keable, tre konataj k-doj en Brita maldekstra medio, petis kian rolon SATEB povas ludi en la progresema monda medio.

Oni diskutis pri la ligo kiun SATEB devas firmigi kun la sindikato en Britio. Jakvo parolis pri la elekto kiun P.K. de SAT faris aliĝinte kiel asocio al la Socia Forumo, okazonta en St Denis komence de Novembro 2003.

Je loka nivelo SAT kaj la LEA-oj devas daŭre kontakti la sindikatojn kaj esperi ke ili malfermu menson al Esperanto kiel internacia komunikilo. Ni nur povas esperi ke dum la Socia Forumo en Francio, la hejmlando de la sidejo de SAT, ni povos montri la utilecon de Esperanto. SAT devas substreki ĉe la diversaj sindikatoj ke nur "Internacia Solidareco" povas helpi nin en la batalo kontraŭ kruda kapitalismo kaj la kapitalisma tutmondiĝo kiuj detruegas ĉiujn formojn de sociala justeco kaj egalrajteco inter homoj.

La distra vespero donis al mi la senton kunludi en filmo de Ken Loach. K-do Vilĉjo Simcock pianoludis kiam ni kantis la "SAT-Himnon" kaj kantojn kiel: "En malliberejo", "Maja marŝo", "La bosko fraksena", "Sub signo de la "nova lun'" kaj "La esperon". Mankis, laŭ mia espero kantado de "La internacio". Sed Ken Keable fluigis nian laboristan sangon per viola ludado de irlanda popolmuziko kaj kantado de proletaj kantoj.

Por mi la vespero estis sufiĉe emocia. Maloftas ke ni tiel plene ĝuas la historian laboristan etoson. Kompanoj inter kompanoj, kamaradoj inter kamaradoj, amikoj inter amikoj. Estas fakto, ĉi tie la sango estas daŭre ruĝa. Ĉi tie daŭre regas la socialismo. Ne la socialismo de la politikaj partioj sed la socialismo kiun ni bezonas en nia batalo kontraŭ subpremo.

Dimanĉo komenciĝis per prelego de Aleksander Korĵenkov pri "Metropoliteno" kaj la verkisto Varankin. La prelego montris la polemikan karakteron de la verko kaj de la verkisto. Anne Johnson legis la libron en la angla kaj ne vere laŭdis la enhavon. Stan Keable, kiel estas lia kutimo, intervenis per kelkaj tre interesaj "piednotoj", kiuj rilatis la momenton kiam la verko aperis kaj estas verkita. Li referencis al la grava verko de k-do Lanti " Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio"?

Gary Mickle faris duan prelegon pri la sama temo "Novdekstrismo kaj Naciismo", sed bedaŭrinde tiam mi jam devis iri al la stacidomo de Staford kie mi devis kapti trajnon al Londono - Bruselo - Antverpeno. Rob Blow afable veturigis min al Staford. Dum la vojaĝo al Antverpeno mi legis "Kandid" de Volter en traduko de k-do Lanti.

Entute mi estis 10 horojn survoje. Mi do povis finlegi la tutan libron. Kiam mi fermis la libron mi legis sur la frontopaĝo la nomon de E. Lanti. Certe li fierus, mi pensis, se li scius pri la kamaradeco kaj la laborego en SATEB. Regule homoj laŭdas mian laboremon por SAT. Mi evidente scias ke ne necesas laŭdi min sed ĉiujn k-dojn kiel tiuj de SATEB. Iliaj ideoj kaj agadoj donas al mi la forton daŭrigi.

Malgraŭ deziroj de reakciuloj maldekstro daŭre ekzistas. Progresema ne estas nur vorto. Esperanto ja funkcias. Mi estis en Barlastono, mi partoprenis SATEB-Kongreson, mi scias. Ni fosas nian maldekstran progreseman socialisman sulkon.

Mi volas inviti ĉiujn kiuj povas, veni al la kunsido de LEA-Komitato dum SAT-Kongreso en Ĉaŭdefono. La k-doj de la diversaj LEA-oj bezonas nian subtenon

Jakvo - 34.781 -



Ni ridu.......

DU AMIKOJ

Renkontiĝas du amikoj. Unu estas timema kaj trankvila viro kaj alia estas konata virinamanto. La unua ĵus edziĝis kaj en la konversacio li diras al la alia :

- Ĉu vi scias, mi tute ne amoris kun mia edzino antaŭ la geedziĝo. Kaj vi?
Alia respondas :
- Mi ne scias. Kiel nomiĝas via edzino?

*****

Kio estas la plej eta mezurunuo de la distanco?
Respondo : milimetro !

Kio estas la plej malgranda mezuro de likvaĵoj ?
Respondo : mililitro !

Kio estas la plej malgranda mezurunuo de inteligenteco?
Respondo : militisto !

*****

EN LA ARMEO

La patrino de Toto diras al sia filo: "Kiam vi soldatservos, al la demando de oficiro vi devas respondi: "JES, mia komandanto!"

Toto venas al la armeo kaj la oficiro demandas al li :
- Kian aĝon ci havas ?
"JES, mia komandanto ! - respondas Toto.
"Ĉu ci primokas min? - ekkrias la oficiro.
"JES, mia komandanto !"- firme respondas Toto.